



Aliĝilo por Lahtio, p. 11–12



♦ **Membrokotizoj de UEA 2019, p. 5**

♦ **Aŭtunaj Tagoj / Trejnseminario en Lahtio, p. 6**

♦ **Somera kurso 5.–9.6.2018 en Lahti, p. 13–15**

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.

Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Originaj tekstojn eblas reaperigi kun indiko de la fonto.

Alkuperäiset tekstit ovat uudelleen julkaistavissa lähdemaininnan kanssa.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Cefredaktoro: *Robert Bogenschneider*

Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ brilanto@gmail.com

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisinpaja.info

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 25 €/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu la antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

☎ 044 264 2742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 300

Kansi/Pärm/Kovrile: Transdono de la kongresa flago. Foto/Kuva: Robert Bogenschneider

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihteerii/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Börje Eriksson, Kulmakatu 10 A 6, 15140 Lahti. ☎ 040 779 3487 ✉ bovoe73@gmail.com

Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ tiina.kosunen945@gmail.com

Arja Kuhanen, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ kuhanenarja@gmail.com

Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 524 5823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi

Anna Ritamäki-Sjöstrand, Cedersvägen 10, AX-22100 Mariehamn. ☎ 050 379 3146

✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

Miamaria Saastamoinen, ☎ 050 32 89 612 ✉ miamaria.saastamoinen@gmail.com

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA: FI44 5630 4550 0426 25 OKOYFIHH

(UEA/EAF Paula Niinikorpi) Adreson vidu supre. / Katso osoite ylhäältä.

Oficejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.

☎ 044 264 2742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/finnlando

”Kongresa turismo”

Kvindeko da aktivuloj kunvenis semajnfine meze de septembro en feriejo Lepola en Lahti en la tradiciaj Aŭtunaj Tagoj de EAF. La programo estis tritaga trejnseminario por la Universala Kongreso en Lahti: la 104-a UK, la kvara okazanta en Finnlando. Post nur dek monatoj! Vidu aliloke en la gazeto pri la seminario, la LKK kaj la emblemo de la kongreso.

Foje ni povas aŭdi komentojn ke Esperanto estas nur hobbio, eble interesa sed en la reala mondo sen serioza rolo. Niaj aranĝoj, de lokaj, landaj kaj regionaj ĝis tutmondaj, estas laŭ tia vidpunkto ne utilo sed babilo, sen ia fincelo, ”kongresa turismo”.

Ja ni scias ke ni havas celon. Ne venkon, des malpli ian finan venkon. Nia celo estas lingva interkompreniĝo de homoj sen privilegioj al iuj ajn nacioj; tio povus esti nomata la sennacieca flanko de niaj aspiroj. Nia celo estas ankaŭ libera evoluo de ĉiuj popolaj lingvoj, ilia rajto de ekzisto sen esti sufokata de regiona ekonomia aŭ ŝtata politika premo; tio povus esti nomata la nacia flanko de niaj aspiroj.

Aspiri al tiaj celoj ne havas finon, konstantan staton kiun atingi finus la historion. Ne ekzistas tia fino, sed konstante ĉeestas la celo kaj la aspiro.

Tio signifas konkrete, ke ni fosas nian sulkon: ni kulturas demokratian egalecon inter ni, akceptas unuj la aliajn ne kiel anoj de nacioj aŭ ŝtatoj

Kulttuurimatkaŭla

Esperantistit kokoontuvat tapahtumiin, joista monia kutsutaan kongresseiksi. Nimityshän tarkoittaa järjestöpäätöksiä tekevää sääntömääräistä kokoontumista, edustajakokousta, liittokokousta. Suomen Esperantoliiton maaliskuisia talvipäiviä ei sentään sanota kongressiksi,



Tuomo Grundström. Knabo kreskis kun UEA: membro dum 50 jaroj. Fotis Anna Ritamäki-Sjöstrand.

kun anoj de aliaj nacioj aŭ ŝtatoj, sed kiel homoj kun homoj. Ni kreas komunumojn, kiuj komunlingve respektas ĉiujn lingvokomunumojn.

Jes, ni ofte aŭdas ke Esperanto ne rolus en la mondo de praktika utileco. Konsentite – tia rolo dume estas marĝena. La rolo de helplingvoj, naciaj lingvoj uzataj internacie, estas necesa. Ankaŭ ni esperantistoj devas praktiki tiujn helplingvojn, dum ni fosas nian sulkon libere lingvedemokratian.

Naciaj helplingvoj en la internacia vivo estas kiel fabriko kaj oficejo; Esperanto kiel vera komunlingvo estas kiel ĝardeno kaj biblioteko.

si, vaikka niitten aikana pidetään liiton vuosikokous. Syyspäiviä taas voisi kutsua retkeily- ja kulttuuripäiviksi.

Tämänvuotiset syyspäivät Lahden Lepolassa olivat työntäyteiset. Aiheena oli ensi vuoden esperanton maailmankongressi ja siihen valmis-

tautuminen. Kongressiseminaari oli kolmpäiväinen. Kun valmistaudutaan ottamaan vastaan väkeä viikoksi kahdentuhannenkin osanottajan verran, on ratkaistavana monia asioita ja tarvitaan paljon sitoutuneita talkoolaisia. Heitä oli koolla puolensadan joukko, mukana kaikki paikallisen järjestelytoimikunnan – LKK, Loka Kongresa Komitato – kymmenen jäsentä (nimet ja kuva toisaalla lehdessä) ja Esperanton maailmanliiton, UEA:n, kongressisihteeri Clay Magalhães. Lahden matkailu VisitLahti sekä kaupungin majoitus- ja muut palvelut ja päätahtumapaikka Isku Areena ovat valmiina ottamaan kongressin vastaan. Seminaariväki pääsi perehtymään Lahden nykypäivään ja historiaan esperantoksi opastetuilla kierroksilla.

Esperanton maailmankongressi, Universala Kongreso, on toki järjestäjänsä, Esperanton maailmanliiton (UEA, Universala Esperanto-Asocio) edustajakokous, mutta suurin osa

kongressivieraista tulee ilman virallisia järjestötehtäviä. Kongressi tarjoaa synergisen paikan kaikille, joita kiinnostaa se reilun yhteiskielen aate, jonka toimiva tuotos esperanto on; kirjallisuus, musiikki ja taide, joita esperantoyhteisöissä luodaan; isäntämaan kuten kaikkien maitten ja kansojen olemukseen tutustuminen tasa-arvoisesti. Sanalla sanoen, esperantokongressit – Lahdessa 104:s, Suomessa järjestetyistä neljäs – ovat kulttuurimatkailua.

Esperantoa sanotaan usein apukieleksi. Zamenhofkin käytti tätä nimitystä, mutta myös jo ensi tekstissään nimitystä *La internacia lingvo*. Jälkimmäinen on osuva, sillä oikeastaan juuri kansalliset kielet ovat kansainvälisen elämän apukieliä, pakollisia juttuja. Ne ovat kuin tehdas ja konttori, aito yhteiskieli ja sen kulttuuri-
piiri on kuin puutarha ja kirjasto.

Tuomo Grundström

Esperanto-societo Antaŭen informas

- 10.10. je la 17.15 Vizito al Kulturdomo 'Laikku' (vd. en reto).
- 10.10. je la 11.30–13.00 Esperanto-klubo
- 05.11. je la 17.00 Novembra vespero
- 19.11. je la 17.00 Elektokunveno
- 10.12. je la 17.00 Zamenhof-vespero

Iun antaŭen-anon vi renkontas en Nesto, nia klubejo, ĉiujn lundojn je la 16–17. Pli-ajn (kaj ĝisdatigitajn) informojn vi trovas ĉe la retejo: www.esperanto.fi/grupoj/tampere/programo/

*Bonvenon!
Estraro*

Premio Deguĉi 2018

Premio *Onisaburo Deguĉi* estis starigita en la Jubilea Jaro 1987 per kapitalo donacita de Oomoto. Ĝi celas distingii meritajn agantojn, kiuj longtempe laboris per Esperanto por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la ideo de D-ro Zamenhof kaj la instruoj de Onisaburo Deguchi. Ĝi konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj. Per decido de la Estraro de UEA, Premio Deguĉi de la jaro 2018 estas aljuĝita al: *Katalin Kováts*.

laŭ GK 750

Membrokotizoj de UEA 2019 / Esperanton maailmanliiton jäsenmaksut 2019

UEA faris gravajn ŝanĝoj al sia kotizosistemo ekde la membrojaro 2019. La novaj membrokategorioj estas:

MB (Baza Membreco) 44 €

Ĝi ofertas la membrecon inkluzive de:

- reta legado de la revuo Esperanto;
 - aliro al la reta membrospaco;
 - rabato ĉe kongresaliĝo;
 - rabato ĉe libroservo;
 - aliro al Delegita Reto (jarlibro).
 - reta legado de Kontakto (ĉe TEJO-membroj)
- Jarlibro papere ne plu estos parto de la servoj. Ankoraŭ malklare estas, ĉu UEA presos iun etan kvanton por tiuj homoj, kiuj nepre volas havi ĝin papere. Pri prezo ankoraŭ ne eblas diri ion.

MA (Membro Abonanto) 74 €

Aldone al la avantaĝoj de MB, aliĝantoj ricevos la revuon Esperanto (kaj Kontakto, se ili estas ankoraŭ en TEJO-aĝo).

Dumviva membreco:

Ankoraŭ eblas aliĝi kiel DM / DMJ laŭ la nuna tarifo **ĝis la 31-a de decembro 2018**.

Ekde la 1-a de januaro 2019 aplikiĝos la tri-dek-oblo de jara membrokotizo, do estos la jenaj kostoj:

DMB (Dumviva Membro Baza) 1320 €

DMA (Dumviva Membro Abonanto) 2220 €

Aliaj pagoj / muita maksuja:

Simpla abono / revuo Esperanton tilaŭs 35 €

Revuo Kontakton tilaŭs 25 €

Societo Zamenhof -subtenkotizo /

-tukijäsenyys 148 €

Patrono de TEJO / TEJO:n tukijäsenyys 88 €

Esperanton maailmanliiton jäsenmaksuihin on tullut huomattavia muutoksia. Uudet jäsenmaksut ovat:

Baza Membreco (MB), "perusjäsenyys" 44 €

Tämä jäsenmaksu sisältää seuraavat jäsenedut:

- revuo Esperanton sähköinen tilaus;
- UEA:n sähköisen jäsenivuston käyttö;
- alennus kongressimaksusta;
- alennus UEA:n kirjavälityksen tilauksista;
- Delegita Reto ("jarlibro") sähköisesti;
- Kontakton sähköinen tilaus (TEJO-ikäiset)

Vuosikirja (Jarlibro) paperisena ei kuulu enää jäsenetuihin. UEA selvittelee, onko mahdollista painattaa pientä määrää paperista vuosikirjaa niille jotka sen kuitenkin haluaisivat. Vuosikirjan tuleva hinta ei ole vielä selvillä.

MA-jäsenyys (jäsenmaksu revuo

Esperanton tilauksella) 74 €

MB-jäsenluokan etujen lisäksi revuo Esperanton tilaus.

Ainaisjäsenyys:

31.12.2018 asti maksetut ainaisjäsenyydet nykyisen DM / DMJ maksukategorian mukaan.

1.1.2019 alkaen ainaisjäsenmaksu on 30-kermainen vuosimaksu:

DMB (perusjäsen) 1320 €

DMA (jäsen revuo Esperanton tilauksella) 2220 €

Pagoj al konto / Maksut tilille:

FI44 5630 4550 0426 25

Pliaj informoj / Tiedustelut:

Paula Niinikorpi (ĉefdelegito)

Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori

040 527 4821, cefdelegito@esperanto.fi

14 elstaraj agantoj diplomitaj en Lisbono

En la Solena Fermo de la 103-a Universala Kongreso en Lisbono estis anoncigitaj la nomoj de 14 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Diplomo pri Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007.

Diplomo pri Elstara Agado

José Antonio del Barrio (Hispanio) pro la elstara gvidado de la hispana movado, kiel prezidanto de la Landa Asocio. Aparte agnoskindaj estas la iniciatoj kies efiko estas la plifortigo de faka agado: la komunaj hispanaj kongresoj kun ILEI en 2018 (Madrido) kaj kun IFEF en 2019 (Malago), kun apartaj meritoj pri kultura, informa, eksterrilata agado.

Ranieri Clerici (Italio) pro la elstara agado en UEA (iama estrarano kaj vicprezidanto, iama delegito de UEA en Ĝenevo ĉe UN); en Italio, inter alie pro la prizorgo dum multaj jaroj de la rilatoj de Itala Esperanto-Federacio kun la ĉefa teledid- kaj radielsendo (RAI).

Maritza Gutiérrez González (Kubo) prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio, pro la longtempa aktivado en Kubo (ĉeforganizado de la TAKE 2018 en Havano; agado ĉe la Esperanto-redakcio de Radio Havano) kaj en UEA (iama estrarano kaj komitatano).

François Lo Jacomo (Francio), matematikisto, membro de la Akademio, pro la multjara reprezentado de UEA ĉe Unesko en Parizo, inter alie kiel ĉeforganizanto de la ceremonio de la 11-a decembro 2017.

Sun Mingiao "Semio" (Ĉinio) pro la fonda kaj estrado de la Esperanto-muzeo en Zaozhuang-Universitato kaj la sukcesa enkonduko de Esperanto-fako ekde la venonta semestro.

Mónika Molnár (Hungario) pro la rekonata lerto kiel instruistino, lernejevigantino, altnive-la pedagogo.

Masako Tahira (Japanio) pro la longdaŭra laboro por Esperanto, aparte en la kampoj tradukado kaj reviziado kaj pro la elstara aktivado en la Kansaja regiono; krome pro la plurjardeka engaĝiĝo en la ĵurio de Oratora Konkurso.

Zlatko Tišljar (Kroatio / Slovenio) pro la granda rolo ĉe kreo de la Zagreba Metodo kaj la longjara aktivado kiel instruisto, sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), redaktoro de la Eŭropa Bulteno, organo de EEU.

Diplomo pri Elstara Arta Agado

Cristina Casella (Italio) pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo, kiel kantisto de pluraj mondscale konataj nuntempaj kantoj, tradukitaj al Esperanto, kies videoj furoras ĉe *Youtube* kaj sociaj retoj.

István Ertl (Hungario/Luksemburgo) pro la elstara kontribuo al la Esperanto-literaturo, kiel verkisto, aŭtoro inter alie de *La Postdomo*; ankaŭ kiel aktiva ĵuriano de *Fondaĵo Grabowski*.

Fabrice Morandea "FaMo" (Francio) pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo, kiel akordion-ludanto, kantisto, aktiva membro de la Kompanoj kaj inter alie pro la ĵus lanĉita albumo "Brel en Esperanto".

La Perdita Generacio (Svedio) pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo, kiel populara popmuzika bando, kies muziko ĝojigis centojn da homoj dum junularaj kaj kulturaj aranĝoj.

Cyrille Poulet "Platano" (Francio) pro la elstara kontribuo al la repstila Esperanto-muziko, inter alie per la eldono de la unua hiphopa KD en Esperantio, en la duopo *La Pafklik*, kaj la daŭra aktiveco unuope, sub la artista nomo Platano.

Martin Wiese (Svedio) pro la elstara kontribuo al la rokmuzika Esperanto-kulturo, inter alie kiel kunfondinto de la bando *Persone* kaj la daŭra furoreco nun, unuope aŭ kun la Talpoj.

GK de UEA

Enigma de emblemo



Ĉiu UK havas certajn grafikajn atributojn, almenaŭ unu, la emblemon. Krom tiu povas esti alia simila – glumarko, poŝtmarko, stampo...

Ofte la emblemo estas desegnita bildo de grava landmarko, konstruaĵo aŭ kultura aŭ natura vidindaĵo en la urbo aŭ lando kie la UK okazas. Kiam oni rigardas la antaŭajn emblemojn oni rimarkas ke ili estas tre diversaj tra la jaroj. Ĉiu emblemo iamaniere estas identigilo por la aktuala urbo, lando kaj kulturo kaj kelkfoje ankaŭ rilatas al la temo de la UK.

La naskiĝo de nia Lahtia emblemo estis longa procezo kaj ĉar mi estis unu parto en ĝi mi volas iomete malfermi kelkajn pensojn rilate al la emblemo, kiu certe ne diras tre multe al homoj kiuj tute ne konas nek la urbon Lahti nek la landon kaj la kulturon de la lando kiu gastigas la 104-an kongreson. Ĉi tiu artikolo ne estas fina klarigo de ĉiuj simbolaj elementoj en la emblemo, lasu ni al la kongresanoj mem spertojn de la kongresa semajno inspiri al pliaj imagoj.

En la relative malgranda urbo Lahti ne estas tre multaj videblaj landmarkoj, tamen almenaŭ du vere bone videblaj: la tri famaj skisaltejoj kaj la du radiomastoj, kiuj ankaŭ videblas en la emblemo/glumarko de Esperanto-klubo de Lahti. Tria landmarko, aŭ eble oni diru akvomarko, nome la lago *Vesijärvi*, kontraŭe al la aliaj, ne estas konstruita de homoj. Ĉi tiuj tri landmarkoj estis la ĉefaj elirpunktoj dum la planado de nia emblemo. Krome unu, kantele/kantelo, la finna nacia kordinstrumento, ludas gravan rolon, ne nur en la emblemo... kaj ankaŭ la temo de la UK 2019 (Vivanta naturo, floranta kulturo) multe influis dum la planado. Post skizoj kun pli malpli videblaj skisaltejoj,

radiomastoj kaj lagoj ni tamen finfine venis al multe pli simpligita simbolo en kiu oni povas vidi diversajn, por la 104-a UK karakterizajn elementojn.

Nun ni jam povas rigardi la detalojn. La tri skisaltejoj estas eble al ili kiuj iomete konas la urbon Lahtio plej facile rekoneblaj kvankam ili reale estas diversgrandaj, tamen ja kvalito ne ĉiam estas same kiel grandeco. La linioj ne simbolas nur spurojn, oni povas vidi ilin kiel radio- aŭ akvo-ondojn, aŭ eĉ nordlumon. Tamen ili ankaŭ memorigas pri la kordoj de la muzikinstrumento kantele/kantelo. La finna vorto *kieli* signifas lingvo, tamen ankaŭ kordo, kantelo estas do ”lingvoinstrumento”, *kielisoi-tin*, kvankam fakte kordinstrumento.

Inter la kordoj videblas du flamoj, finne *liekki*. En la dua nacia lingvo de Finnlando, la sveda, oni parolas pri *eldtungor*, ”fajrolangoj” kio alproksimigas al lingvoj. Ĉi tiuj du videblaj flamoj estas parto de vico komencanta je indiĝenaj lingvoj, kiel la sameaj, kaj kontinuas kun la lingvoj de novaj enmigrintoj. Tiel la multlingveco de la mondo ankaŭ videblas kaj la verda signo de l’espero brile sin prezentas en ĉi tiu sfero.. Tio samtempe donas al la emblemo universalan aspekton.

En la skisaltejoj la ĉefa direkto estas suben, en la emblemo oni povas senti movon ankaŭ supren kaj samtempe ŝanĝon. En la naturo kaj je kreema kulturagado homo trovas harmonion kaj ĝojon por si mem. Iĝu ankaŭ la grandaj idealoj de l’homaro pli ol vortoj kiam individuoj kune penas transiri la barojn kiuj malfaciligas la konkordon inter homoj kaj detruas harmonion inter naturo kaj kulturo.

Börje Eriksson



La teamoj de Portugalio kaj Esperanto en komuna foto post la futbalmatĉo.

Varmegis la 103-a Universala Kongreso en Lisbono

Sabaton la 28-an de julio grupo de finnoj alvenis al suna Lisbono por kongresi: partopreni kunsidojn, prelegojn, ekskursojn - kaj reklami pri la sekva universala kongreso en Lahtio. Ni estis dudeko da esperantistoj kaj kune kun ni reklamis reprezentantoj de la turisma organizaĵo VisitLahti kaj de Isku Areena, nia estonta kongresejo. La semajno estis varma kaj suna, la sudaj vesperoj mallumaj kaj mildaj. Tiina kaj mi ekskursis al malnova kastelo kaj al renoma vinproduktejo, ambaŭ tipaj de la regiono. Ni havis bonan tempon dum bankedo kaj balo, kaj ĝuis aŭskulti la prezenton de lisbona



faduo dum vespera ekskurso. Tamen ni ankaŭ laboris deĵorante ĉe la budo de la 104-a UK kaj gvidante niajn Lahti-ajn gastojn. Demandoj estis variaj kaj bele montris intereson al la venonta kongreso. La samon ni sentis ankaŭ vendrede dum la programero Venontaj kongresoj, kiam komentoj kaj demandoj venis el plenplena salono. La vera kulmino de la kongresa semajno estis dum fermo la 4-an de aŭgusto, kiam la verda Esperanta flago estis transdonita el Lisbono al Lahtio.

Päivi Saarinen



La jutubokanalo SvisRakonto prezentas la 103-an Universalan Kongreson de Esperanto filme.

1-a kaj 2-a - Kongresaj Tagoj (Alveno kaj Malferma Tago):

www.youtube.com/watch?v=ĉ94QaLDvEA&t=32s

3-a Kongresa Tago: www.youtube.com/watch?v=Y4BdsqDqohI&t=170s

4-a Kongresa Tago: www.youtube.com/watch?v=YoNzcb897WM&t=5s

5-a Kongresa Tago (reĝisorino *Nelida Weidmann-González Fonseca*): www.youtube.com/watch?v=WW115qFmdw

La futbalmaĉon por la Pokalo Zamenhof eblas spekti tie:

www.youtube.com/watch?v=2TkpvVCSFEk

La esperantistoj perdis la ludon, sed ili gajnis la korojn de la lokanoj en Lisbono! Ĝuu la maĉon, se vi ne ĉestis mem en Lisbono kaj reĝuu ĝin, se vi ĉestis – kaj jam vi scias, kiun programeron vi nepre ne maltrafu en Lahtio!

(Subtenu la filmojn de SvisRaporto abonante la kanalon kaj signalante la filmojn per la dikfingro supren kaj diskonigu la filmojn publikante la ligilon sur viaj paĝoj, dankon!)

Dietrich Michael Weidmann

Vizitindaj aranĝoj en eksterlando

troveblas ĉe eventoj.hu/2018.htm.

Aŭtunaj Tagoj / Trejnseminario en Lahtio



La LKK de la venonta UK. De maldekstre Päivi Saarinen, vicprezidanto, kongresejo; Clay Magalhães, konstanta kongresa sekretario de UEA; Larissa Phileas, junulara programo, reta informado; Börje Eriksson, membro, blindulaj aferoj; Tiina Oittinen, ekskursoj; Synnöve Mynttinen, Lahtiaj aferoj; Tuomo Grundström, prezidanto; Sigrid Kivistö, infana kongresejo; Jukka Pietiläinen, informado; Tiina Kosunen, ĝenerala sekretario, volontuloj kaj Paula Niinikorpi, arta kunordigo, kasisto.

Aŭtunaj Tagoj kaj Trejnseminario pasis bonorde en la venonta UK-urbo Lahtio. Partoprenantoj estis pli ol 50, bonega nombro. Post rondveturo, kiun gvidis niaj kvar ĉiĉeronoj ekzercante sian ĵus akiritan lingvoscion, ni vidis la ĉefan kongresejon Isku Areena. Post lunĉo en la restoracio *Lämäri* (glacihokea bato) ni rondiris la tutan ejon. Sekvis veturado al la feriejo Lepola, kie ni diskutis pri kongresaj aranĝoj kaj faris gruplaborojn. KKS *Clay Magalhães* kunestis kun ni ekde sabato. Li restis ĝis lundo, kiam eblis por eta grupo viziti la prelegejon en apuda lernocentro kaj tranoktejojn ekster la urbocentro. La etoso de la evento estis bonhurmora kaj esperplena.


Dankon al ĉiuj, nun ek al la preparlaboroj de la venontjara UK!

*raportis Tiina Oittinen, fotoj Larissa Phileas
(LKK kaj ejoj en Isku Areena).*



Unu de la flankaj ĉambroj

ALIĜILO LAHTIO



104-a UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
20 – 27 julio 2019
Lahtio, Finnlando

Konstanta adreso:

104-a UK de Esperanto
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
www.uea.org (eblas aliĝi ankaŭ rete)

Kongresa numero:

ĈIU ALIĜANTO UZU APARTAN ALIĜILON (BONAS ANKAŬ FOTOKOPIO DE ĜI) – BONVOLU TAJPI
AŬ SKRIBI PRESLITERE. LAŬBEZONE METU KRUCON EN LA KONCERNAJN KVADRATETOJN.

FAMILIA NOMO VIRO/VIRINO
(por alfabeto ordigo) (forstreku la nevalidan)

PERSONA(J) NOMO(J) UEA-KODO -

ADRESO (nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo)

LANDO TEL. (kun prefikso)

NASKIĜDATO RETADRESO

Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko. (Aliĝojn sen kotizpago oni ne traktas.)

- Mi sendas ĉi tiun aliĝilon al mia landa peranto kaj samtempe pagas al tiu (vidu dorse sube).
 - Mi sendas ĉi tiun aliĝilon al la CO en Roterdamo kaj pagas laŭ la suba specifo:
 - al la bankokonto de UEA (aldonante 10 €; el EU-landoj senkoste) (bv. cirkti): en Nederlando: IBAN: NL86 ABNA 0426 9014 44, BIC: ABNANL2A; Belgio: IBAN: BE54 0001 6318 3197, BIC: BPOTBEB1XXX; Germanio: IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNKDEFF; Svedio: IBAN: SE95 9500 0099 6042 0074 3740, BIC: NDEASESS; Svislando: IBAN: CH86 0900 0000 1200 2310 0, BIC: POFICHBEXX.
 - per Visa/Amex/Mastercard n-ro valida ĝis
! Visa- kaj Mastercard-kontrolnumero (tri ciferoj, dorse de la karto)
 - per PayPal (interreta pagsistemo; al financoj@co.uea.org).
 - bv. debeti mian/la UEA-konton: - (La kontoposedanto, se alia ol la aliĝanto, nepre rajtigu skribe UEA pri la pago! La pagorajtigo atingi UEA samtempe kun la aliĝilo.)
 - Mi ne volas ricevi la paperan Duan Bultenon (mi legos ĝin en la UK-retejo).
- Se vi aliĝas kiel kunulo, bv. indiki ĉi tie la nomon/kodon de la ĉefaliĝinto:
- Se vi aliĝas kiel handicapulo, ĉu UEA jam havas atestilon? jes / mi kunsendas (forstreku unu)
- Se vi aliĝas senpage, bv. skribi ĉi tie la kialon (vidu dorse):

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn dorsflanke sur ĉi tiu aliĝilo kaj donas permeson al UEA uzi miajn datumojn por registri min al la UK, kontakti min kaj aperigi mian nomon en la Kongresa Libro kaj UK-retejo. Mi donas permeson al UEA aperigi mian adreson en la Kongresa Libro, krom se mi indikas alie ĉi-sube.

- Bv. aperigi en la Kongresa Libro mian retadreson anstataŭ mia poŝta adreso.
- Mi ne volas ke adreso mia, poŝta aŭ reta, aperu en la Kongresa Libro.

DATO SUBSKRIBO
(Aliĝilon sen subskribo oni ne traktas!)

Por uzo de la administracio/peranto:		KOTIZO (vidu dorse)
UEA-membro en kategorio/jaro		DONACO AL KONGRESO
UEA-spezfolio n-ro:		INFANA KONGRESETO
konfirmo de peranto:		FONDAĴO CANUTO
PAGO EN CO	KONFIRMO	FOND. PARTOPRENU UK-ON
		ENTUTE (en eŭroj)

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ la jena grupo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B.

B: Iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko kaj Latina Ameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al landa peranto (vidu liston en la Unua Bulteno, aŭ en la reto ĉe www.uea.org/aligoj/perantoj; ankaŭ pluraj aliaj informoj pri la Kongreso aperas en la UEA-paĝoj). **La CO en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la 15-a de junio 2019. Post tiam, oni aliĝu surloke dum la UK.**

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV. ATENTE LEGI LA ĈI-PAĜAJN KLARIGOJN.

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (ĉiuj en eŭroj)	ĝis 31 dec. 18 1-a periodo		ĝis 31 marto 19 2-a periodo		ekde 1 aprilo 19 3-a periodo	
	A	B	A	B	A	B
1. membro de UEA en unu el la kategorioj: DM/DMJ, MB(T), MJ(T) aŭ MA(T)	190	145	240	180	290	215
2. MG aŭ ne individua membro de UEA	240	180	300	225	360	270
3. komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA	95	70	120	90	145	110
4. kunulo/junulo/handikapulo, MG aŭ ne individua membro de UEA	145	105	180	130	215	155

DIFINOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM aŭ DMJ), Membro Baza 2019 (MB aŭ MB-T), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T). *Aligitaj Membroj kaj Membroj kun Gvidlibro (MG) eniras kategorion 2, kiam temas pri la kongresa kotizo.*

Komitatano: Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA en la momento de la aliĝo.

Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon, kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu naskiĝis inter 89 01 01 kaj 98 12 31 (inkluzive). Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo kaj sendu kopion de identigilo kie aperas la naskiĝdato.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo nepre postulas akompananton (ekzemple blindulo), kaj kiu pruvis tion per kuracista aŭ simila atestilo, kiu klare indikas la tipon de handikapo.

Senpage aliĝas:

- infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 98 12 31 (sendi kopion de identigilo kie aperas la naskiĝdato);
- nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono. Fraŭdo kun la nomŝildo estas punebla per konfisko de la nomŝildo kaj malpermeso al la fraŭdanto(j) plu partopreni tiun kongreson. Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO aŭ ĉe peranto. Aliĝilon sen kompleta pago aŭ pago sen (subskribita) aliĝilo oni ne traktos.

Kongresa Regularo (ekstrakto): “8. Kongresanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK.” Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton al la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalajn Kongresojn.



Se vi pagas al peranto, bonvolu sendi ankaŭ la aliĝilon al tiu.

Se vi pagas rekte al konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.

Somera kurso 5.–9.6.2018 en Lahti

La ĉi-jara eksterlanda instruisto de la Somera kurso, *Nina Pietuchowska*, sendis salutojn kaj skribis siajn impresojn pri la kurso. Ankaŭ kursanoj rakontis pri iliaj spertoj kaj/aŭ sendis fotojn. Dankon al ĉiuj!

*Tiina Oittinen,
kursorespondeculo*

De Nina Pietuchowska:

Jen miaj kelkaj impresoj pri la junia E-kurso en Lahti – la venontjara kongresa urbo. Ĝi estis por mi tute nova sperto kaj por miaj gekursanoj mi pensas ankaŭ. Kun kelkaj jam mi renkontiĝis pli frue dum diversaj renkontiĝoj, kelkaj estis tute novaj personoj. Ili ĉiuj diligente laboris ĉiutage lernante la lingvon diversmaniere, serioze kaj malserioze... Ili faris diversajn frue preparitajn taskojn, preparis dialogojn, aktorin. Ĉiuj devis uzi nur Esperanton ĉar mi ne sciis la finnan, helpis "Poŝamiko", papera kaj reta vortaroj, ge-partoprenantoj helpis unu la alian.

Komunaj manĝoj, posttagmezaj ekskursoj tra la urbo donis eblecon uzi la lingvon praktike admirante belan naturon. Por mi estis ebleco konatiĝi kun la urbo por poste reklami ĝin por estontaj sekvontjaraj gekongresanoj.



Kursanoj studas bildojn sur la tablo. Fotis Nina Pietuchowska.

Sukcesojn dum la organizado de la sekvontaj kursoj. Senprobleman organizadon de la sekvontjara UK.

*Brakumojn –
amike, Nina*

De Juha Metsäkallas:

Sommarkurs i Esperanto i Lahtis

Jag hade gått på vanliga kurser i esperanto i en folkhögskola ett par år, innan jag vågade mig att delta i en kurs där läraren talar endast esperanto. Fjolårets kurs i Raumo var den första och årets kurs i Lahtis var den andra sommarkursen för mig.

Den främsta orsaken till att kursen arrangerades

i Lahtis var väl att man ska arrangera nästa sommar världskongressen där. Tanken var väl att slå två flugor i en smäll: att locka lokala wannabe-esperantister, att aktivera de redan existerande och att bekanta med kongresstaden. Nå, jag listade upp tre "flugor", men låt gå.



Också den här gången hade man två grupper: en för nybörjare och en annan för de längre hunna. Jag tror att i nybörjargruppen började man väl riktigt från början och där talade läraren både esperanto och finska. Jag vet inte exakt det där för jag hamnade i gruppen för de längre hunna. Eller hamnade och hamnade, för min lärare från folkhögskolan rekommenderade den gruppen för mig och jag samtyckte med hen. I gruppen för de längre hunna var läraren från Polen, och hen låtsade att inte kunna annat än sitt modersmål och esperanto, så jag var tvungen att tala esperanto – polskan kan jag nämligen inte. Jag tycker det var bra att bli tvungen så där.

Det där med vilka grupper bildas och vem hör till vilken, tycks vara svårt. Den ursprungliga tanken var väl tre grupper med en mellan-nivågrupp, men kanske det var för få deltagare och därför hade man två grupper. Detta ledde till att några i gruppen för de längre hunna var tydligen för mycket över sin nivå, och så fick jag höra att nybörjargruppen började alldeles från början för somliga.

En sak som jag inte tyckte om, var att en del deltagare deltog bara delvis i undervisningen. Med det menar jag att de kanske var på plats



Vespermanĝo ĉe Timo, fotis Sylvia Hämäläinen.

under förmiddag men inte på eftermiddag, eller tvärtom. Det skapade litet rastlöshet och måste ha vållat problem hos läraren med tanke på vad som ska undervisas.

Några lokala guider har övat esperanto sedan vintras under en för dem skraddarsydd kurs kurs. Nu hade dom möjligheten att öva med andra esperantister och pröva på att guida på språket. Tyvärr kände dom sig skraja eller annars inte mogna för det, men det blir väl andra tillfällen att öva. Kämpa på!

*Juha Metsäkallas
el Turku/Åbo*

De Leena Lindqvist:

La unua junia mardo estis malvarmega, kaj trajnaj problemoj malfaciligis la vojaĝon al Lahti, sed la etoso en la kursejo, Wellamo-instituto, estis agrabla.

Ĉi-foje la eksterlanda instruisto venis el Pollando: *Nina Pietuchowska* gvidis dek progresantojn kaj *Sylvia* laboris kun la elementa gru-

po kaj kelkaj ĉiĉeronoj el Lahti, kiuj lernas la lingvon por la UK de 2019. Nina efike plivastigis niajn vortrezorojn per diversaj ekzercoj: ni parigis sinonimojn el du listoj, kunigis nomojn de bestoj kun bildoj, formis plej eble multajn novajn vortojn el literoj de 'esperantisto' – ekzistas surprizante multaj. Ni ankaŭ serĉis

substantivojn, kiuj ofte aperas kun certaj ad-
jektivoj, ekz. 'saĝa kiel strigo'. Kaj ni rakontis
pri manĝoj, ĉambroj kun instalaĵo, vendis kaj
aĉetis provizaĵojn, lernis vortojn de trafikiloj,
skribis kaj aktoris dialogojn kaj korektis erarojn
en diversaj taskoj. Nina havas grandan stokon
de ekzercoj kaj ŝiaj ideoj ne elĉerpiĝis.

Marde ĵurnalisto kaj fotisto el *Etelä-Suomen Sanomat* alvenis al nia klasĉambro kaj la sek-
van tagon aperis artikolo pri la kurso, ankaŭ
reklamante la UK-n venontjare.

Pro la malvarma vetero la planita rondira-
do en la urbo ŝanĝiĝis al kafumado en kafejo
Sinuhe, kie ĉiĉerono *Sinikka Koskinen* rakontis
pri la historio de Lahti. Merkrede ni vizit-
tis la urbodomon kaj tre admiris la belajn deta-
lojn ankaŭ interne. Arkitekto *Eliel Saarinen*
verdire pensis, ke ĉar ofte malagrablaj aferoj
devigis lahtianojn en la domo, ili devus havi
belan ĉirkaŭaĵon, kie negocadi. Saarinen de-
segnis ankaŭ la meblojn mem. – Vendrede en
la programo estis vizito en la preĝejo *Ristin-
kirkko* kun ĉiĉerono *Helli Jalas* kaj vespere en
la Sibelius-domo kun ĉiĉerono *Päivi Oksanen*.
Ni ankaŭ pase eniris en *Multi-Culti*, centro
malfermita por ĉiuj, kaj finnoj kaj enmigran-
toj. Tiu ĉi centro funkcias jam pli ol 20 jarojn,
sed lastatempe la nombroj de vizitantoj kreskis
forte, estante pli ol 6.000 personoj dum la ko-
menco de tiu ĉi jaro.

La kulmino de la tuta kurso por mi estis la
vesperumo ĉe *Timo Väänänen*. Li prezentis
siajn diversajn kantelojn kaj ludis ekz. dancon
el *Vitele*. Ĉarme! Koran dankon! Ankaŭ la nut-
ro por la korpo estis tre bongusta. Por la fino de
vespero ni kune kantis i.a. Fabellando-n.

Koran dankon al niaj instruistoj Nina kaj Syl-
via, al kursorespondeculo *Tina* kaj al kursoest-
ro *Börje*, al ĉiĉeronoj Sinikka, Helli kaj Päivi
pro interesaj gvidadoj! Estis bone renkonti gea-
mikojn, konatiĝi kun novaj esperantistoj kaj
samtempe plibonigi sian lingvoscion.

*Leena Lindqvist
el Kuopio*



En la urbodomo, fotis Ulla Oksanen el Helsinki.



Lago Pikku-Vesijärvi en Lahti, fotis: Ulla Oksanen.

Baltiaj Tagoj en Pärnu

Pärnu situas ĉe la maro kaj havas longan plaĝon, dunojn, verdajn parkojn kaj aleojn. La BET (Baltiaj Esperanto-Tagoj) okazis en la urbodomo, kvartaga evento. Sepdeko da partoprenantoj el 11 landoj, la plej fora el Hispanio. Duono de la partoprenantaro ne aŭskultis la prelegojn, nur la solenan inaŭguron. La Fermon en la Kulturdomo ĉeestis iom pli ol duono el la aliĝintoj.

La programo de BET konsistis el salutoj kaj prelegoj kaj unu ekskursita tago en la insulo *Kihnu*, kien ne ĉiuj povis iri, ĉar la buso pleniĝis rapidege. En la Malfermo *K. Rohdin* salutis la estonojn primemorigante la svedan-estonan kunlaboron en la 20-a jarcento. La du sekvaj tagoj ne sufiĉis por ĉiuj kiuj volis prezenti sin kaj sian temon. La someran Universitaton gvidis PhD *Vjaĉeslav Hromov*, UEA-delegito, kiu estras la EIE (Esperanto-Instituto de Estonio). Sinjoro Hromov posedas plurajn lingvojn: latinan, rusan, anglan, Esperanton, kaj vastajn sciojn. Li ĝentile rezignis kelkajn siajn temojn por doni tempon al aliaj parolemuloj. La surmura listo de la prelegoj iom ŝanĝiĝadis dum la evento, bedaŭrinde mankis taŭga informtabulo. Interesaj prezentoj sekvis unu la alian sen aliaj paŭzoj ol la manĝopauzo je la 12-a – 13-a horoj.

Temoj:

- Dialogi interkulture, plibonigi la mondon per Esperanto (*Tõnu Hirsik*)
- Interlingvistika agado en *Tartu* (*M. Linnamägi*)
- La unua latva esperantisto *R. Libeks* (*M. Želve*)
- Originala literaturo en Esperanto (*G. Silfer*)
- Esperantaj verkistinoj (*P. Martinelli*)
- Esperantisto kaj bankisto Paŭlo Medem (*V. Šilas*)
- Kuracmetodo *Zeitschiene* de *Margarete Bettmann* (*E. Lobjakas*)
- Agado de EIE 1925–2018 (*V. Hromov*)
- Religioj favoraj al Esperantio en Estonio (*V. Hromov*)

- Mia hejmurbo *Hyvinkää* (*R. Pyhälä*; fakte mi havis nur 5–10 minutojn da tempo kaj ne povis diri multon nek montri fotojn)
- Pri katoj, Rondo-Kato kaj *M. Boulton* (*I. Näsholm*)

Bedaŭrinde *T. Grundström* el Finnlando ne povis veni kaj prezenti sian prelegon pri la finna verkistino *Aino Kallas* kaj ŝia kunlaboro en Estonio.

Reprezentantoj de Litovio disdonis la broŝuron por la sekva BET-55 en *Panevėžys* 6.–14.7.2019.

Post disdonado de demandoslipetoj laŭtlegetaj *G. Silfer* provis diskutigi la aŭskultantojn pri la penso, ĉu Esperantio estas movado aŭ popolo. Li defendis la nociojn movadaro kaj popolo.

Pärnu estas ĉarma ferioŭrbo, la somera centro de Estonio, kun multegaj kafejoj kaj restoracioj favorprezaj, koncertoj, preĝejoj, statuoj, parkoj, interesa miksaĵo de arkitekturaj stiloj. Estonoj amas florojn, kaj tio ĉie videblas. Muzeoj troveblas, vidu www.visitparnu.com. Multlingvaj broŝuroj haveblas en la Informejo en la Urbodomo. Amuza detaleta: Sur la plaĝo virinoj tradicie rajtas sunumi sin nudaj sen iu ĝeno de aliaj sinbanantoj. Viroj ne altrudas sin al ili. Ili sportumas kaj ludas diversajn pilkoldojn. La marakvo ankoraŭ estis sufiĉe freŝa (+17 gradoj).

La fermo de BET-54 okazis en bela Kulturdoma salono, kie ni sidis ĉe malgrandaj rondaj tabloj regalataj per kafo kaj kukoj. Tõnu Hirsik prezentis al ni la grupeton, kiu helpis lin aranĝi la eventon. Kelkaj ĉeestantoj improvize kantis kaj kantigis. T. Hirsik ankaŭ kolektis la plastajn nom-ŝild-ujetojn por eviti malŝparadon kaj poluadon. Dankon al li kaj aliaj estonaj esperantistoj. En la fino ni en ganda rondo ripetadis: *Al paco kaj amikeco per Esperanto, ĝis revido!*

Post BET mi kun amikino Kerstin, s-roj Hromov kaj *Roman Švetsov* veturis per aŭto al *Saaremaa*. La pramo de la kontinento al la insulo transiras en duonhoru. Dume, krom la kunvojaĝantoj

kaj granda nombro de aŭtoj ni vidis brilantajn marvastaĵojn kaj remorkojn plenaj de betulaj kaj pinaj arbotrunkoj k.a.

En Kuressaare ni tranoktis en la hejmo de *Virve Ernits*, esperantistino pli ol 80-jaraĝa sed mense vigla, bonkora, scivolema. Ŝi havas imponajn kolekton de poŝtmarkoj kaj libron. Ni vizitis la lokan bibliotekon, kies ĉefino gvidis kaj rondiris nin tie. Venis ankaŭ loka redaktoro/fotisto *Veljo Puujalg*, kiu metas fotojn, videofilmetojn kaj tekstojn en retpaĝojn de IEI.

Ni vidis la famajn fortikaĵojn kaj sanatoriojn, vizitis la belan florplenan tombejon, kie ni metis florojn sur la tombojn de s-ino *Helgi Hromova* (mortinta en 2016, aktivulo de ILEI) kaj esperantisto *Karl Ojassoo* (1869–1926). Aliĝis al ni loka esperantisto *Boris Nikolajev*. S-ro Hromov paroladis pri la agado de Ojassoo dirante, ke lia esperantisteco ne estas konata kvankam

lian agadon en aliaj kampoj oni notis, laŭdas kaj memoras.

Vesperon ni pasigis ĉe s-ro Hromov ĝuante grandegan akvomelonon, trinkaĵojn, interbabiladon, sciigojn pri abelbredado kaj mielo.

Reveninte al *Tallinn* Kerstin kaj mi vizitis ŝian malnovan amikinon *Helju Viires*. Ŝi surtabligis kvin specojn da tre bongustaj buterpanoj kaj tri specojn da tortoj, vinon, sukron, kafon kaj teon. Helpis ŝin ŝia pranepo kaj *Anne Valk*. Vere ni estis regalataj ĉie en Estonio, eĉ ricevis donacojn.

En Finnlando atendis plia programo: ekspozicio pri korespondado kaj Esperanto en la biblioteko de *Turenki*, lunĉo en malgranda pensiula manĝejo, vizito al la naskiĝejo de la plej fama finna aktorino *Ida Aalberg* (1857–1915).

Saliko

Novaj el Saaremaa

La tria periodo de EIE-agado post la 4-a de Junio 2018 en *Kuressaare*.

En Kuressaare denove funkcias Esperanto-Instituto de Estonio (EIE) fondita en 1925.

La agado inkluzivas E-turismon, studadon de E-historio de Estonio, kunlaborado kun E-mondorganizaĵoj kaj lingvokonsultado de unuopuloj kaj grupoj de E-interesitoj persone aŭ interrete.

Instruistoj: *Vjaĉeslav Hromov* (PhD), *Virve Ernits* (diplomita), *Eve Otsa* (diplomita).

La lasta kunlaboras kun *Saaremaa* el *Tallinn*. La kontaktelefonon estas +372/5303 5577 krom vendredo, sabato, dimanĉo.

La 4-an de Junio 2018.

En Saaremaa agadas 11 esperantistoj, registritaj de EIE.

Dek esperantistoj jam ricevis atestilojn pri elementa aŭ plena finstuda Kurso de Esperanto. Estas petoj daŭrigi novan kurson aŭtune 2018.

Estis farita nova retejo pri Esperanto en interreto.



Vjaĉeslav Hromov ja *Roman Ŝvetsov* vizitis la Esperanto-oficejon 14.8.2018.

Unu EIE-studento (*Veljo Puujalg*) jam laboras pri la temo Historio de E-movado en Saaremaa. La loka *Radio KADI* transdonas muzikajn salutojn (E-kantojn) por esperantistoj.

Vjaĉeslav Hromov
Eve Otsa



Merja kaj Tiina ĉe la budo de EST en Aurala (Fotis: JM).

Esperanto-societo en Turku

La 21-an de aŭgusto estis tn. Seniorotago en la Civitana Instituto de Aurala en Turku. Kiel kutime ankaŭ ĉi-foje Esperanto-societo en Turku (EST) havis tie budon por informi pri Esperanto. La kursoj de EST komenciĝis la 11-an de septembro.



*Jukka Laaksonen
fariĝis 70-jara en
julio kaj dankas
ĉiujn pro gratuloj.*

50 jaroj da elstara agado: honorigo de ESF

Dum la fermo de la UK en Lisbono, UEA speciale honorigis la usonan fondaĵon ESF pro 50 jaroj da elstara agado. Fondita en 1968, ESF (en la angla: *Esperantic Studies Foundation*) celas antaŭenigi lingvan justecon kaj lingvan komunikadon, kun speciala atento al Esperanto. Pro ĝiaj grandaj kontribuoj al la movado, precipe en la lastaj dudek jaroj, la Prezidanto de UEA petis la ĉeestantajn estraranojn kaj kunlaborantojn de ESF veni sur la podion por ricevi la aplaŭdojn de la publiko.

Dum tridek jaroj post ĝia fondo, la rimedoj kaj agado de ESF iom post iom kreskis, danke al donacoj kaj heredaĵoj de diversaj esperantistoj. Ekde la jaro 2000, pro heredaĵo de esperantista paro *Bill* kaj *Cathy Schulze*, ĝi komencis pli grandskalan aktivecon ankaŭ sur la tereno de lernado kaj instruado de Esperanto. Ĝi financis centojn da diversaj projektoj, interalie

- ellaboron de la edukaj retejoj *lernu.net* kaj *edukado.net*,

- kreon de skriba korpuso de Esperanto: *tekstaro.com*,
- plurajn *Nitobe*-simpoziojn (plej lasta el kiuj okazis ĉi-jare en Lisbono),
- kreon de la dokumentfilmo *The Universal Language* kaj la videokurso *Esperanto – Pasporto al la Tuta Mondo* (havebla plene ĉe YouTube),
- starigon de Esperanto-ekzamenoj laŭ la KER (Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj),
- kaj de CED-fonduso por subteni studojn pri Esperanto kaj interlingvistiko.

ESF daŭre subtenas la postdiplomajn studojn pri interlingvistiko kaj esperantologio en Poznano, NASK – Nord-Amerikan Someran Kursaron – altnivelajn studojn de Esperanto en Usono, donas plurajn stipendojn al esploristoj por esploroj kaj publikigo, kaj subtenas la laboron de la redaktoro de Edukado.net per ĉiumonata honorario.

laŭ GK 751

Literatura konkurso 2018

Jam okfoje "Esperanto-Libraro" en Bjalistoko kune kun Bjalistoka E-Societo organizas modestan literaturan konkurson por esperantistoj, kiuj deziras rakonti pri la beleco de nia E-mondo. Ne timu verki mem. Inter ni ne estas nobeluloj sed geamikoj pretaj disvastigi nian belan lingvon. Decembre, okaze de Zamenhof-tagoj en Bjalistoko, ni enmanigas premiojn, diplomojn. Al ĉeestantoj ni proponas libretojn kun la

10 plej belaj verkoj. Estu inter ni!!! Ekproponu la ĉeeston al aliaj en via klubo.

Retpaĝo kun la kondiĉoj troviĝas ĉe *espero.bialystok.pl/eo/literatura-konkurso-2018/*

*Plejamike salutante
Ela Karczewska
bibliotekistino
Bjalistoko/Pollando*

Irja Miettinen en mia memoro

En la jaro 1956 nia familio post 7 jara ekzilo en Fora Oriento en Amura regiono de Sovetunio finfine ricevis permeson reveni hejmen al Latvio, al nia naskiĝurbo Rigo. Ankaŭ nia Esperanto-movado tiam komencis reviviĝi post longa silenta kaj kaŝiĝa periodo. Mi daŭrigis mian studadon en Riga Pedagogia Instituto en Fako pri Fiziko, en la 3-a kurso. En oktobro aperis anonco, ke en nia instituto estos kurso de Esperanto. Tiam mi tuj aliĝis, mi sciis, ke estas tia lingvo, mia patro iam rakontis al mi pri siaj vojaĝoj antaŭ la milito tra Eŭropo uzante Esperanton. Jam dum la unua leciono la instruisto disdonis al ni adresojn por korespondi kaj mi ricevis ankaŭ la adreson de *Irja Miettinen* el Finnlando, el *Lappeenranta*. Do, ni komencis korespondadi.

Irja estis nur kelkajn jarojn pli aĝa ol mi, ankaŭ fraŭlino, profesia fotistino, havis patrinon, fratinojn *Sylvia*, du fratojn kaj de unu frato du nevinojn – 5-jaran *Marja* kaj 4-jaran *Anne*. Mi eĉ ricevis fotojn de ĉiuj familianoj kaj de Irja mem, ankaŭ fotojn de ŝiaj vojaĝoj. Irja skribis ankaŭ pri siaj korespondgeamikoj el diversaj landoj, pri Finnlando, pri lernejoj, la eduka sistemo. Same ankaŭ mi skribis pri mia studado, pri la studenta praktiko en lernejo kaj uzino, pri familio k.t.p. Irja kolektis pupojn en diverslandaj naciaj kostumoj, mi sendis bildojn de diversaj latvaj naciaj kostumoj kaj ankaŭ pupon en nacia kostumo. Irja laboris kiel fotistino, sed helpis ankaŭ kune kun *Sylvia* al sia patrino, kiu posedis vendejon de edziĝfestaj vestoj kaj vualoj. Ili ofte provis la edziĝvestojn kiam kudristinoj volis pli bone vidi la rezulton de la laboro. Irja skribis, ke en Finnlando estas tia kredaĵo, ke knabino, kiu provas veston kaj vualon de la fianĉino, neniam ricevos propran fianĉon. Kredu aŭ ne, sed bedaŭrinde Irja ne edziĝis. Pri



Biruta kaj Irja.

tiu sama temo Irja skribis ankaŭ pri moro dum superjaro, kiam virinoj rajtas svatiĝi je viroj.

Ni ja estis fraŭlinoj! Estis interese korespondi kun Irja. Ŝi multfoje invitis min viziti ŝin, sed por mi tio ne estis ebla, ĉar permeson veturi eksterlanden mi ne ricevus.

Nur en 1990 la unuan fojon mi renkontis Irjan en *Viipuri* (Viborgo). Min invitis esperantistinoj de Leningrado (St.-Peterburgo) por partopreni la renkontiĝon kun finnaj esperantistoj en Viipuri. Estis tre agrable kaj emocie finfine renkontiĝi kun Irja, renkonti ankaŭ aliajn konatulojn – *Eini*, *Kauno* kaj *Tiina Kilpinen*, konatiĝi kun *Jorma Toropainen*, *Lauri Häkli* kaj aliaj. Tiam mi eksciis, kiom grava por finnoj estas la urbo Viipuri, por kelkaj ĝi estis eĉ naskiĝurbo kaj iama loĝloko ĝis la milito kun Sovetunio. Mi kun Irja povis paroli malkaŝe, en nia vivo jam estis multaj ŝanĝoj, mi edziniĝis kaj havis filinon, sed patrino kaj fratino de Irja jam forpasis. Ni ambaŭ jam estis pli aĝaj, preskaŭ pensiulinoj. Irja min kaj mian filinon invitis viziti Lappeenranta. Baldaŭ nia lando post 50-jara okupacio reakiris la sendependecon. Post unu



Irja juna.



Kristnasko 1956: Irja kun filinoj de frato Risto – Anne kaj Marja.

jaro mi kun mia filino *Baiba* (tiam 15-jaraĝa) gastis ĉe Irja dum kelkaj tagoj. Ni estis tre bone akceptitaj, Irja montris al ni la urbon kaj ĉirkaŭajn lokojn, ni partoprenis ankaŭ Johanan feston ĉe Saimaa-lago. En Latvio Johana festo estas ĉiam tre grava kaj bela, estis interese rigardi, kiel oni festas ĝin en Finnlando. Ni gastis ankaŭ hejme ĉe *Selma*, *Aune* kaj *Jorma*, sed ĉe Irja ni renkontis ĉiujn esperantistojn de la urbo. En la hejmo de Irja ĉiam okazis kunvenoj de lokaj esperantistoj. La hejmo de Irja, ŝia bonkoreco kaj afableco akcepti gastigi esperantistojn de la plej diversaj lokoj, precipe de najbara lando estis tre populara kaj uzata.

En 1996 al mi skribis estimata kaj bone konata esperantistino el St.-Peterburgo, *Barbara Cvet-*

kova: „Mi havis feliĉon dum unu monato ripozi en Lappeenranta. Tio estis bela sonĝo: pura akvo, pura aero kaj varma vetero. Mi loĝis ĉe Irja, havis apartan ĉambron kaj multe pentris.”

En 1991 okazis la 76-a Universala Kongreso en *Bergen*, mi kune kun *Māra Timermane* organizis busan veturon de niaj latvaj esperantistoj al la UK. Pro tio, ke ni ne sukcesis aĉeti biletojn por la pramo de *Tallinn* al Stokholmo en ĝustaj datoj, ni decidis veturi tra Finnlando ĉirkaŭ la Botnia golfo, tra Svedio al Norvegio kaj tiel atingi Bergen, fari bonegan vojaĝon. Nur unue ni devis iom veturi ankaŭ tra Rusio ĝis la limo kun Finnlando. Rusaj doganistoj nin kontrolis 5 horojn, forprenis monon, se iu havis pli ol 50 dolarojn, forprenis alkoholaĵon. Finnaj doganistoj siavice forprenis terpomojn, fumaĵitan viandon kaj kolbason, ĉar laŭ la landlima regularo oni rajtis kunpreni viandon nur en konservoj, sed ni havis en la buso nutraĵon por nia tuta vojaĝperiodo, ni ja estis limigitaj en la monrimedoj pro la ŝanĝoj.

La doganejo estis proksime de Lappeenranta. Mi telefonis al Irja. Ŝi invitis nin veturi al Lappeenranta tranokti, en la urbo nin atendis Irja kaj *Jorma*. Ili jam interkonsentis kun aliaj lokaj esperantistoj, kien nin enlokigi por unu nokto, ni ĉiuj havis dormosakojn. Post tia terura doganeja travivaĵo ni ĉiuj estis tre bone, sincere, amike akceptitaj ĉe finnaj esperantistoj. Frumane ni, tre dankemaj al niaj finnaj esperantaj amikoj, kiuj nin akceptis, daŭrigis nian tre interesan vojaĝon, la unuan vojaĝon tra nordaj „kapitalismaj” landoj al nia unua UK. Ni ĉiuj estis ravitaj pri la vojaĝo tra Nordaj Eŭropaj landoj, pri la 76-a UK de Esperanto, pri niaj novaj amikoj, kaj la impresoj kaj memoroj restis por la tuta vivo.

Poste Irja ofte veturis al niaj Baltiaj Esperanto Tagoj en Latvio, Estonio kaj Litovio, tiam ni ĉiam renkontiĝis, Irja veturis ankaŭ al mi kaj mi al ŝi en Lappeenranta. Irja estis tre bona homo kaj tre bona mia amikino.

Biruta Rozenfelde

Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-55)

Litova Esperanto-Asocio afable invitas vin partopreni la vicajn ĉiujarajn internaciajn some-rajn tradiciajn 55-ajn Baltiajn Esperanto-Ta-gojn (BET-55). La aranĝo estas dediĉata al la 100-jariĝo de Litova Esperanto-Asocio.

DATO: la 6-14-an de Julio, 2019. Veni al la aranĝo eblas jam la 5-an de Julio.

LOKO: BET-55 okazos en la nordlitovia urbo *Panevėžys*, kiu situas ambaŭflanke de la rive-ro *Nevėžys*, 136 kilometrojn nordokcidenten for de la ĉefurbo de Litovio *Vilnius*.

PARTOPRENO: ni invitas ĉiujn esperantistojn. La kvanto de la partoprenantoj ne estas limigita.

ALIGKOTIZO Ĝis 31 Dec. 2018:
35 eŭroj por esperantistoj el ekssovietiaj kaj eks-socialismaj Eŭropaj landoj;
55 eŭroj por okcidentanoj kaj egaluloj.
Ekde 01 Jan. 2019 plus je 10 eŭroj. Infanoj, ler-nantoj kaj studentoj aliĝkotizon ne pagas.

ALIGŬO: rete sendante la aliĝilon al *litova.ea@mail.lt*.

Retan aliĝilon (http://esperanto.lt/aligxilo_BET.html) Vi povas trovi en la retejo de BET-55: <http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET55>.

Tri novaj Honoraj Membroj de UEA

En la 103-a Universala Kongreso en Lisbono UEA ricevis tri novajn Honorajn Membrojn.

Pro iliaj gravaj servoj al la tutmonda Esperanto-movado la Komitato de UEA distingis s-inon *Maria Rafaela URUEÑA ALVAREZ* (n. 1942 en

Bilbao, Hispanio), s-ron *Josep FRANQUESA i SOLÉ* (n. 1937 en *Sant Feliu de Codines*, Katalunio, Hispanio), kaj s-ron *Sudo NAN Youli* (n. 1942 en Pekino, Ĉinio).

laŭ GK 747

Ĉiuj – daŭre aldoniĝantaj – sonraportoj de la **Pola Retradio** pri la Lisbona UK ekde 28.07.2018 estas – krom ĉe www.pola-retradio.org – aŭskulteblaj ankaŭ pere de: www.youtube.com/results?q=pola+retradio&sp=CAI%253D

red. Barbara Pietrzak

Plian sonartikolon (daŭro: 6,54 min) verkis kaj produktis *Paŭlo Sergio Viana* el Brazilo. Vi trovas ĝin ĉi tie: esperantaretradio.blogspot.com/2018/08/kongresaj-spertoj.html

Bonvolu spekti kaj aŭskulti ankaŭ la kanton ”Kometo” de *Georgo kaj Dominika Handzlik*.

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. www.esperanto.fi/helsinki jukka.p.pietilainen@gmail.com (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 onni.kuappinen@gmail.com
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 044 953 4454 kimmo.hannula@creavit.fi, www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com
- ♦ Esperantoseura Antaüen r.y. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere www.esperanto.fi/grupoj/tampere (Tapani Aarne: tapani.aarne@mbnet.fi) ☎ 050 5245 823)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. www.esperanto.fi/grupoj/turku tiina.oittinen@pp.inet.fi ☎ 050 549 4709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 ITELFIHH (445023-283606)
- ♦ Näkövammaisten esperantoyhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. <http://www.steleteo.fi/> ☎ (09) 660 651 steleteo@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen jäsen). bovoeo73@gmail.com.

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla, Salossa ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteyshenkilöt sivulla 2.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2018

Nro	Limdato	Aperas
5/2018	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 €	1/1 sivu/paĝo 50 €
1/2 sivu/paĝo 60 €	1/2 sivu/paĝo 30 €
1/4 sivu/paĝo 40 €	1/4 sivu/paĝo 20 €

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktoje:
eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo:
Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65,
00530 Helsinki.

Aliĝu al
Roskilde-Festivalo

en Roskilde, Danio

29.06 – 07.07.2019

Laboru en Esperanto-teamo de volontulaj gardistoj



- ✓ Ujutna skandinavia etoso € 0 Partopreno en mondfama rokmuzik-festivalo (kutime € 250!)
- ✓ Facila alveno de Kopenhago aŭ Malmö € 0 Komune kuirita vegana manĝo
- 3x8h Laboro per Esperanto en amuza teamo kun multaj esperantistoj € 0 Loĝado en komunaj tendoj
- € 32 Luksa tendejo / antaŭpago



Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Aineisto 15.11.2018 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 15.11.2018 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.